

HISPANA ESPERANTO

Ilustrita ĉiumonata gazeto, por la propagando de Esperanto kaj diskonigo de la Historio, Arto, Literaturo, folkloro kaj naturaj belaĵoj, de nia lando.—Redakcio: Glorietta de Bilbao, 5.

Julio Mangada Rosenörn.—MADRID

II ^a JARO	NUM. IX—SEPIEMBRO	II ^a JARO
-------------------------	-------------------	-------------------------

LA REĜO KAJ NIA VIII^a KONGRESO

La Prezidanto de H. E. A. ricevis la jenan komunikaĵon:

«SUPERA DOMESTRECO
DE LIA REGA MOŜTO

» Lia Reĝa Moŝto (kiun Dio gardu), plezure komplezante viajn dezirojn, decidis akcepti la titolon «Honora Prezidanto de la VIII^a Nacia Kongreso de Esperanto,» kiun okazigos tiu Asocio en Oviedo, de la 14^a ĝis la 18^a de la proksima septembro, tial ke kore, vi, je la nomo de la Asocio, proponis al li tian prezidantecon.

» Ĉi tion, laŭ Reĝa Ordono, mi komunikas al vi por via kono kaj sekvoj.

» Dio gardu viun dum multaj jaroj.

Santander-Palaco de la Magdalena-la 30^{an} de julio de 1929.

La Grafo de Maceda

Al S-ro Vicente Alonso Sanz, Prezidanto de Hispana Esperanto-Asocio.»

ĴUSA SUKCESO DE H. E. A.

La Ministerio de Publika Instruado ĵus decidis 1.500 pesetojn kiel subvencion al nia Asocio. Ni ĝoju pro tio, sed ankaŭ spertu, kaj laŭ aliloke de ĉi tiu n-ro oni diras, laboru por ke la nombro da membroj de H. E. A. pligrandiĝu kaj tiel vidigu la gravecon de nia Asocio.

VIII^a NACIA KONGRESO DE ESPERANTO

Honora Komitato

Prezidanto: Lia Reĝa Moŝto Alfonso XIII^a

Vicprezidantoj: Medicina Doktoro kaj Prezidanto de la Ŝtata Konsilantaro, Moŝto Carlos M. Cortezo; Moŝta Provincestro kaj generalo Francisco de Zubillaga; Provinca Deputatestro Moŝto; Provinca Militestra Moŝto; Episkopa Moŝto; Urbestraj Moŝtoj de Oviedo kaj Gijon.

Voĉdonantoj: Universitata Rektoro, Instituta Direktoro, Direktoro de la Normala Lernejo, Direktorino de la Normala Lernejo por virinoj, Direktoro de la Komerca Lernejo, Inspektorestro de 1^a Instruado, Prezidanto de la Ateneo, Prezidanto de la Komitato por Turismo, Prezidanto de la Komerca Ĉambro, Delegito de Belaj Artoj, Direktoro de la Lernejo por Belaj Artoj, Direktoro de la Lernejo por Artoj kaj Metioj, Prezidanto de la Ekonomia Societo de Amikoj de la Lando, Direktoro de la Pastra Lernejo.

Organizanta Komitato:

Prezidanto..	S-ro	Antonio Jimenez Mora
Sekretario ..	>	Luis Garcia Fernandez
Kalkulisto ..	>	Valentin Alvarez Gonzalez
Voĉdonanto.	>	Mario Garcia Fernandez
	>	Mariano Cantalapiedra
	>	Fernando Suarez Pis

Ĉi tiu Komitato petas je ĉiuj samideanoj havantaj librojn aŭ esperantaĵojn la alsendon tujan por la ekspozicio, ĉar post la Kongreso ĉion la Komitato redonos.

La ekspozicio de lernejaj laboritaĵoj estos sukcesege rimarkinda kaj geistruistoj devas aliĝi tuj al la Kongreso kaj decidi viziti ĝin por vidi la laboritaĵojn el lernejoj de multenombraj landoj.

La fervojaj Kompanioj de la Kantabra regiono faris grandajn rabatojn.

Aliĝu tuj kaj decidu la vojaĝon al Oviedo por ĝui belegajn tagojn de la Kongreso.

VIIIª Nacia Kongreso de Esperanto en Oviedo


Aliĝintoj

(*Daŭrigo*)

- 127.—S-ro Teodoro Elizondo Cabeza, Comerciante. Bilbao.
- 128.— » Manuel Elezcano Maiztegui. Idem.
- 129.— » Víctor O. de Allende, Ingeniero Jefe provincial de Caminos. Idem.
- 130.— » Enrique Jarero Sánchez. Oviedo.
- 131.— » Alberto Cebreiros Curieses, Abogado. Valladolid.
- 132.— » Mariano Cantalapiedra, Empleado. Oviedo.
- 133.—S-ino Paula Conde de Cantalapiedra. Idem.
- 134.—S-ro Clement Gicquel, Ingeniero Químico. Limoges (Francia).
- 135.— » Vicente Díaz Suárez, Chófer. Oviedo.
- 136.— » Francisco Azorín Izquierdo, Arquitecto. Córdoba.
- 137.— » Francisco Azorín Poch, Estudiante. Idem.
- 138.—S-ino Carmen Poch de Azorín. Idem.
- 139.—Grupo Esperantista «La Verdad Stelo», Orfeón Ovetense. Oviedo.
- 140.—S-ro Ramón Pondal García. Idem.
- 141.— » Pablo Pérez Hernández, Empleado. Idem.
- 142.— » Carlos Martínez, Ferroviario. Sevilla.
- 143.— » Dalmacio Frechilla, Ferroviario. Idem.
- 144.— » Amador Díaz González, Empleado, Oviedo.
- 145.— » Laureano Felgueroso, Empleado y Abogado. Idem.
- 146.— » Carlos G. Valdés. Idem.
- 147.— » Enrique Riestra de la Roza, Periodista. Idem.
- 148.— » Salvador Pérez Martínez, Reina, 45. Madrid.
- 149.— » Juan F. Serra, Libertad, 20. Liria (Valencia).
- 150.—S-ino Sara Ullastres, Doctor Lluís Durán, 66. Mollet (Barcelona).
- 151.—S-ro Agapito Salgado Corchado, Estación de Almansa (Albacete).
- 152.—F-ino Amelia Mangada y Sanz, Glorieta de Bilbao, 5. Madrid.
- 153.—S-ro José Bode Rey, Ebanista. Azcárraga, 10, 4.º Oviedo.
- 154.— » Manuel Ruibal. Idem.
- 155.— » Obdulio Velasco. Idem.

- 156.—S-ro Venancio Girao. Santander.
- 157.— » Valentín Pastor. Oviedo.
- 158.— » Emilio Herrera. Madrid.
- 159.— » Vicente Vallina. Oviedo.
- 160.— » Leopoldo Argüelles. Idem.
- 161.—F-ino Julia Fernández. Idem.
- 162.—S-ro Francisco Gorgues. Barcelona.
- 163.— » Andrés Piñó. Valencia.
- 164.—S-ino Rosa Pérez. Idem.
- 165.—F-ino Amparo Piñó Pérez. Idem.
- 166.— » Rosa Piñó Pérez. Idem.
- 167.—S-ro Ramón Piñó Pérez. Idem.
- 168.— » Pierre Beauchamp. Limoges (Francia).
- 169.—F-ino Esperanza Suárez. Oviedo.
- 170.— » Aurora Martínez. Idem.
- 171.— » Julia Alonso. Idem.
- 172.— » Elena Alonso. Idem.
- 173.— » Anita Viliesid. Idem.
- 174.—S-ro Jaime Viliesid. Idem.
- 175.— » José B. Viliesid. Idem.
- 176.— » José Carnicer. Zaragoza.
- 177.—«Zaragoza Esperantista». Idem.
- 178.—S-ro José Anglada. Barcelona.

(Daŭrigota)




RIMARKINDA OKAZINTAĴO POR ESPERANTO

Ĵus la tuta Registaro vizitis la gravegan Foiron de Gijon kaj la standon specialan por Esperanto, en kiu amase, riĉe, varie, aperis ĉiaj esperantaĵoj. La prezidanto de la Asturia Esp-Federacio, S-ro Jimenez Mora, akceptis la Prezidanton de la Registaro, generalon Primo de Rivera kaj donis al ĉi tiu la insignon de nia VIII Kongreso. La tuta Registaro miris antaŭ la elpruvo pri Esperanto, speciale generalo Primo de Rivera, kiu diris esti

ricevanta multajn esper-presaĵojn, kompreni iom la lingvon kaj interesiĝi por la tutmonda esp.-movado, je kio la ministro de Publika Instruado diris: «Jam mia Ministerio subvencias la Hispanan Esp.-Asocion; sed, konstatante la gravecon de la movado, ni donos plej grandan sumon». Je tiu deklaro, S-ro Jimenez Mora profitis la okazon por inviti la ministron viziti la ekspozicion de lernejaĵ laboritaĵoj dum la tagoj de nia nacia Kongreso, kaj la ministro tion promesis, se liaj okupoj permesus.

Je la adiaŭo generalo Primo de Rivera diris al nia samideano Jimenez Mora: «Adiaŭ, Komandanto; ni ne forgesos ĉi tion».



AL LA KONGRESO DE OVIEDO

Sur la paĝoj de ĉi tiu gazeto same, kiel sur tiuj de «Hispana Esperantisto»; same parole kaj multfoje, mi atentigis ĉiujn pri la nepre neceso por ke aperu nia Asocio (deflankigante nomojn, tendencojn al formo, k.t.p.) kiel potenca aŭ multenombra amaso antaŭ la publiko kaj antaŭ Institucioj, sed precipe antaŭ la Registaro, kiun nepre ni devas impresi, por ke ĝi konsciuj klare pri Esperanto, por ke ĝi helpu nian laboron, por ke ĝi fine enkonduku Esperanton en la Lernejojn. Bedaŭrindege mankas atento kaj intereso de la samideanoj al tiu celo; tiamaniere mankas la atento kaj intereso, ke estas multaj samideanoj, kiuj ne repagas sian jarkotizon, nenion diras, eĉ ne respondas iuj. Kial ĉi tio okazas? Ĉu ĉar la afero ne iras antaŭen? Ne tiel povas esti, ĉar, spite de ĉio, Hispana Esperanto-Asocio progresadas, kvankam malrapide; kaj eksterlande ankaŭ la progresado de Esperanto estas rimarkinda. Oni devas instigi ĉiujn al tutlanda unuiĝo, kiu donos al ni la forton kaj havigos al ni la atenton kaj monhelpon de la Registaro, unue; due, post kelke da tempo, la oficialigon de Esperanto. Oni devas kreskigi entuziasmon ĉies al tiu unuiĝo, ĉar ĉiu vera esperantisto, dezirante la triumfon, devas konscii, ke tiu ĉi ne venos per izolaj klo-

podoj kaj penadoj de iuj, se ĉi tiuj ne povas sin apogi per multenombra potenca samideanaro, ĉar kvankam Aŭtoritatoj kaj Institucioj bone taksu laboradon ties, ili finas dirante: «Jes, mi konas, mi laŭdas vian laboregon; *sed Esperanto ne havas favoran atmosferon, vi estas malmultaj.*» Ĉi tion, bedaŭrinde, mi aŭdis lastan fojon, antaŭ ne multe, ĉe la Ministerio de Publika Instruado, kaj vane mi argumentis pri manko de solidareco; tial ili ne sin decidas al plej granda helpo por afero konsiderata negrava, ĉar nombro de la membraro estas nur al ili la konvinkanta argumento kaj ne decidoj de Registaroj, de Ĝeneralaj Direkcioj fremdaj, de Internaciaj Kongresoj kaj Konferencoj, k. t. p., kiujn ili ne legas, se aŭdas ne aŭskultas kaj atentis, ĉar ili apenaŭ havas tempon por vin akcepti. Se vi montrus al ili abundan kompletan pruvmaterialon, neutili; *tiu manko de tempo (vere nur manko de intereso pro sistema aŭ meĥanika kutimo) ne permesas al ili malprofiti la tempon*, laŭ ankaŭ mi sper-tadis kaj ĵus spertis ĉe la Nacia Patronaro por Turismo. Ĉu ĉi tio signifas, ke ni forlasu tiajn atakojn? Neniel; nepre necese estas daŭrigi ilin, ju pli ofte, des pli bone, ĉar «obstina petanto ion atingas»; sed tio signifas, ke ni faru por la Asocio (kiu estas la idealo al triumfo de Esperanto) tion, kion ni volas, ke aliaj faru por ĝi, ĉar al ni estas tute facile tion fari: *aliĝi kaj aliĝi, pagi la jarkotizon kaj varbi novajn membrojn.*

Ĉu estas io, kio malpermesas tiel agi? Ĉu estas baro al plinombro de H. E. A.? La agado de la Asocio pruvas, ke ĝi funkciadas bone kaj progreseme; ĝi helpis la restarigon de mortintaj Grupoj, helpis la fondon de novaj eĉ de Federacio, okazigis du gravajn Kongresojn naciajn (Madrid-Sevilla) post la ne malpli gravaj organizantaj kunvenoj (kongresoj reale) de Barcelona, Zaragoza, Valencia, Bilbao kaj Cordoba, kaj tuj ni okazigos tiun de Oviedo; obstine agadis kaj agadas por altiri atenton de la Registaro kaj de Institucioj oficialaj, krom tiu de la publiko kaj de la gazetaro, kaj iom post iom sukcesas ĉe ĉiuj kampoj. H. E. A. agadis kaj agas gvidate de konscio: ke la bazo de forta organizaĵo estas *individuo, tutlanda aro el individuoj kaj tutmonda organizaĵo*. Ĝi lasas plenan liberecon al individuoj por sin arigi loke kaj regione laŭ memdecido, eĉ profesie ili povas sin grupigi, rekomendante ke la grupoj lokaj, regionaj aŭ profesiaj, ankaŭ aliĝu kiel individuaj membroj.

Se ni konscius profunde nian devon kiel esperantistoj, nia Asocio rigardus lumoplenan horizonton, fruktodonan morgaŭon depost la Ovieda Kongreso; Ĝi atingus rapide sufiĉe grandan nombron da membroj, kaj tiel Ĝi, per sia ĉiujara dokumentaro al la ministro de Publika Instruado, vidigus grandan sukceson, kiu sekvigus pli grandan subvencion, per kiu H. E. A. havigus al siaj membroj la gazeton ĉu po plej malalta kotizo aŭ senpage, laŭ la subvencio, ĉar tiamaniere estus kiel tute egale la samideanoj de la tuta lando ĝuus la helpon de la ŝtato; kaj la gazeto fariĝus varbilo, stimulo por aliĝi al H.E.A., kiu vere rapide kreskus. Kaj mi vin atentigas kaj konstatas, ke ĉi tiuj antaŭaj diroj esprimataj per kondiĉa modo ne naskiĝas nun, ili estas malnovaj, kaj ilin mi esprimis diversfoje al madriĉad samideanoj, kaj fine mardon, dum kunveno de la centra parto de la Komitato, mi diris al la Prezidanto de H. E. A. (tiam) D-ro Cortezo la jenon: «Vi havas aŭtoritatecon sufiĉan por ke la ministro de Publica Instruado donu al ni ĉiujare difinitan subvencion, kiu ne estas grava por la Ministerio, sed gravega por ni, ĉar tiel ni disdonus al regionaj komitatanoj ĉiujaran sumon por starigi laŭ eblo monpremiojn por lernantoj, stimulant tiel al lernado kaj perfektigado de la lingvo; ankaŭ ni eldonus ĉiunmonatan gazeton senpagan por la membroj de H. E. A., kaj la gazetĉo estus la plej efika varbilo; via influo estas sufiĉa por atingi de la ministro proksimume 5.000 pesetojn, sed se vi nur atingus 2.500-3.000 pesetojn, ĉi tiu sumo sufiĉus por la gazeto kiu donus al ni monon per aliĝoj por la premioj.» Mi silentas pri la sekvoj al miaj diroj kaj iniciativo, la sekvojn rememoros tiuj, kiuj ĉeestis la kunvenon; mi nur esprimas, ke ankoraŭ mi sentas ĉangrenon. De tiam jam estas kelkaj jaroj for, sed mi opinias same, kiel tiam, kaj esperas realiĝu tio, kio ŝajnis al mi dank' al influo de nia kara nuntempa honora Prezidanto D-ro Cortezo facile atingebla. Nun tio dependas de ni mem: agu, do.

Sed kiel agi? Certe sin demandas multaj samideanoj. Estas dirite, ke individuo estas la ĉefa elemento por la organizaĵo; en la lando, ĉiu esperantisto devas aparteni al enlanda ĝenerala organizaĵo, ne devas resti izola, kaj same li devas fakte aparteni al tutmonda organizaĵo, al tutmonda esperanto-movado, aktive pagante jaran kotizon, al la enlanda *du pesetojn* laŭ postulas

ciaj statutoj, kaj al tutmonda esperanto-movado laŭ decido terte venonta pro reorganizo de la nuntempa organizaĵo, sed ĝre malaltan ĉar membro nur rajtos ricevi senpage la membro-karton kaj ĉiujaran banderolon.

Sed la enlanda laboro de nia esperanto-movado estos pli efika, mi opinias, per enurbaj grupiĝoj, kaj des pli se la enurbaj grupiĝoj ariĝus regione, kvankam, kompreneble, esperantisto, tiel dezirante, povos resti izola koncerne la lokan Grupon kaj la regionan aron el grupoj, sed rekomendinde estas, ke tiel ne okazu. Supozante, ke ĉiuj konscias la lokan grupon, ĉi tiu fikso, kiel monatan kotizon, *unu peseton*, el kiu la grupo pagos al enlanda organizaĵo la jarkotizon, *du pesetojn*, al la tutmonda esperanto organizaĵo la difinotan, kaj al regiona la difinotan ankaŭ; kaj por plej bona aranĝo, pago, ricevo de banderoloj, k.t.p., estos tre konvene ke ĉiu esperantisto pagu al la grupo je ĉiu decembro aŭ ĉiu januaro 6,50 pesetojn, por ke la grupo tuj pagu al regiona, enlanda kaj tutmonda, organizaĵoj la respektivan kotizon, ĉar tio ankaŭ liveras efikon, tial ke tuj la organizaĵoj scias kiom da mono havas kaj kion ili povas entrepreni krom scio pri akurata statistiko. Dum februaro kaj ceteraj monatoj, membro de grupo pagos, do, ĉiumonate 0,50 el peseto.

La enlanda organizaĵo devas oferi al siaj membroj parton de la kaskapitalo laŭ eblo, kalkulinte proksimume la elspezojn por la jaro pro poŝtelspezoj kaj iuj servoj deciditaj kaj decidotaj de la Kongresoj, ekzemple: la Kongreso de Sevilla pritraktis la eldonon de enlanda jarlibro por kiam estu ebla laŭ financa stato de la kaso, sed jam estas ebla la afero, ĉar Bohema Esperanto-Servo eldonas ĉiujare Adresaron el esperantistoj de ĉiuj landoj, kaj ni povas sendi al ĝi ĉiujare la kompletan liston de nia enlanda organizaĵo kun adresoj, profesioj kaj deziresprimoj pri interkorespondado, interŝanĝo de poŝtkartoj, k.t.p., kaj la kosto pro la enpresigo kaj ricevo de tiom da Adresaroj kiom da membroj en ĝi aperu estas malgranda kaj tute facile pagebla. Kaj ricevinte la Adresarojn, dissendi ilin senpage al la membroj, kiuj spertos jam kaj tiel pri utilo de nia organizaĵo, kreskigante entuziasmon ĉies kaj stimulantе ĉiujn por konsili aliĝon al ĝi.

Se 'a kaso, pro enspezo de plej granda subvencio de la Ministerio de Publika Instruado, permesus, la organizaĵo unue

(post tio pri la Adresaro) devus dediĉi sumon al la gazeto por ke la helpanta kotizo de la membroj al la gazeto malaltigu pli kaj pli ĝis malapero de tiu helpanta kotizo. Ĉi tiu afero kun la antaŭa estas la plej gravaj ĉar la membroj, ĉiuj senescepte devas profiti kiel eble plej egale la monon de la ŝtato, kaj ambaŭ aferoj estas la plej rektaj al la membroj, la plej elpruvantaj utilon de la organizaĵo, la plej allogantaj por altiri al la organizaĵo kiel eble plej grandan nombron da personoj, la plej trafantaj por restigi la aliĝintojn ĉe la vicoj de la organizaĵo.

Kiam la kaso konsentu, la organizaĵo proporcie al la nombro da membroj po regiono, destinoj sumon por starigo de mon-premioj por ekzamenoj...

Ĉu agi tiel estas utopio? Agi tiel tutplene estas nun neeble, sed ekagi estas tute necese, konvene kaj sukcesige. Amasigi monon en la kaso kaj ne kontentigi iel la membrojn estas memmortiga konduto.

Kio estas la Adresaro? La Adresaro de Bohoma Esp. Servo estas libro jam naŭdekpaĝa aperanta ĉiujare de antaŭ ok jaroj, bele prezentita, kun luksa papero, enhavanta 840 adresojn el pli ol 40 landoj kaj anoncojn de gazetoj, k. t. p., pro kio oni povas konscii ĝian gravecon, kaj la utilon por la hispanaj samideanoj, kiuj havos tial adresojn el multenombraj eksterlandaj samideanoj kune kun tiuj de la samlandanoj, konante la profesiojn kaj intersanĝdezirojn ĉies. Ĝi, do, estas la plej bona solvo al la decido pri nia adresaro voĉdonita en Sevilla, ĉar ankaŭ ĝi estas, krom utiliga pro la aluditaj avantaĝoj, la plej malmultekosta. Plie, nia Asocio montros tiel la vojon al aliaj naciaj Asocioj por fari la samon, kaj solvi tiel tion, kion ĉie oni deziras: Tutmondan Adresaron.

Ni vidu la financon parton de la afero por konscii la tre malkaran solvon: la Adresaro estas liverata al ĉiu, kiu en ĝi aperas, al ĉiu aliĝinto paginta *duonon* da svisa franko; sed ĉi tiu kosto tre malaltigas, ĉar, post interrilitiĝo kun Bohema Esperanto-Servo, ĉi tiu faras grandan rabaton laŭ la nombro da anoncitoj, kaj tial ke ni povas jam anonci 400 membrojn (adresojn kaj intersanĝdezirojn) ni atingos 25% da rabato, t. e., al Hispana Esperanto Asocio koston 400 Adresaroj 150 svisajn frankojn, kiuj laŭ la nuna valuto estas proksimume 200 pesetojn. Oni devas

konscii, ke nia *adresaro* estas tial ankaŭ ĉe la manoj de 840 esperantistoj el multaj landoj.

Mi esperas, ke ĉiuj bone atentos, konscios kaj decidos, la enpresigon de la membraro de H. E. A. en la Adresaron de BES.

Sekve de ĉio antaŭe dirita, mi proponas al la membraro de Hispana-Esperanto-Asocio la jenon:

Disponi la tutan ĉiujaran subvencion de la Ministerio de Publika Instruado por la jenaj servoj:

I^e Por pagi enpresigon de la tuta membraro en la Adresaron de Bohema Esperanto-Servo, por ke H. E. A. ricevu tiom da ekzempleroj kiom da enpresigitoj, kiuj senpage ricevos siajn respektivajn ekzemplerojn, se ili antaŭpagus siajn jarkotizojn al H. E. A. je decembro, kiel estas dirite aliloke, aŭ almenaŭ dum sekventa januaro;


II^e Destini la ceteron al la gazeto «Hispana Esperanto» por helpi ĝian eldonon kaj kompensi la elspezojn sindoneme, entuziasme, faritajn kaj farantajn de nia samideano S-ro Julian Garcia Aguirre, kondiĉe ke la gazeto persistadu same, kiel nun, por kio oni atentos: a) Ke la kompenso kun la sumo el helpantaj kotizoj al la gazeto ne supermezuru la jaran eldonkoston kaj elspezojn pro poŝto, kovertoj kaj dissendado; b) kiam la helpantaj kotizoj kun la cetero de la subvencio kompensu la antaŭajn gazetelspezojn, la Komitato de H. E. A. restigos en sia kaso la supermezurantan sumon, kaj tian estos ĝustatempa okazo por malaltigi la helpantan kotizon laŭ determinos la supermezuranta sumo, agante sinsekve tiamaniere ĝis kiam la gazeto estu senpaga al ĉiuj membroj de H. E. A., malaltigo, do, concernas nur membrojn de H. E. A.

III^e Ke H. E. A., kun la monhelpo de la Hispana Esperanto-Instituto (por kio H. E. A. tion petos je H. E. I.) starigu premiojn por ekzamenotoj, determinante sumon al ĉiu regiono havanta minimume cent membroj de H. E. A., kaj proporcie laŭ nombro da membroj de H. E. A. en ĉiu regiono, sed ĉiam por ekzamenotoj aliĝintaj al H. E. A.

Julio Mangada Rosenörn

Rimarko.—Ĉiu membro de H. E. A. ne kongresanta en Oviedo devas voĉdoni favore aŭ kontraŭe sin turnante al la Prezi-

danto de la Kongreso—*Oviedo*—(sufiĉas tiu adreso); se male al la Komitato de H. E. A. (S-ro Mojado, Abascal, 13, Madrid) esprimante ankaŭ la numeron de sia membrokarto. Mi multe dankus, se aprobantoj kaj malaprobantoj konigus al mi siajn voĉdonojn.



PRI LA KANALOJ TRA AMERIKO

La Kanalo de Panama estis granda teknika eraro, ĉar eĉ ĝi kostis ok fojojn pli, ol se oni estus konstruinta ĝin nivele, sen kluzoj, tra Darien, utiligante la sudamerikan Nilon, la riveregon Atrato, kaj mi nomis ĉi tiun Nilo pro ĝia situo, pro la nekredeble rimarkinda fruktodoneco kaj minerala riĉeco de la teritorioj banataj de ĝi. Tiel opinias anglaj inĝenieroj, studinte bone la teritorion kaj la postulojn de la trafiko. La usonaj inĝenieroj mem deklaras jam, ke kanalo, utiligante la lagon de Nikaragvo, estus kostinta malpli, ne nur por ĝin konstrui, sed ankaŭ por ĝin konservi; kaj jen kial Usono tirane perfortpartoprenas la internajn aferojn de Nikaragvo.

La Istmo de Darien estos vere centro de trafiko de la produktoj de Eŭropo, de Ameriko, de Azio kaj de Oceanio, ĉar nuntempe la funkciado de la kluzoj de l'Panama Kanalo estas kaŭzo de tre malrapida transirado, kaj ĉar estas evidente, ke la disiĝemo kaj sorbemo de la tero, en kiu oni fosis la Kanelon, ĉi ties konservadon faras malfacila des pli, ju pli la tempo pasas; kaj tial la trafiko de la tuta mondo baldaŭ postulos novan kanalon interoceanan sen kluzoj. Krom ĉi tio, la centraj kaj sudaj amerikaj nacioj, por kompleti sian respektivan disvolvigadon, certe devos aliformigi la Naturon, celante al si internajn akvovojojn por la servo de siaj propraj apartaj kaj komunaj interesoj, ne malatentante tiujn de la civilizita mondo, malpli atencante aŭ kontraŭstarante ĉi tiujn lastajn.

Argentino kaj Ĉilo konscias la neceson starigi akvan ligilon inter siaj popoloj tra la teritorioj mem, kaj de antaŭlonge jam

oni pensis fosi kanalon tra ĉi tiu parto de la suda Ameriko. Brazilo ankaŭ tute certe jam konscias, ke iam ĝi devos utiligi siajn supermezurantajn ekonomiajn eblojn por kompleti, interkonsente kun Ekvatoro kaj Peruo, la farojn de la Naturo sia-vice, kunigante la akvon de la Pacifika Maro kun tiu vastega maro el sensala akvo bananta la amerikajn arbaregojn laŭlonge la ekvinoksa linio. Kolombio, hodiaŭ malriĉa, kies teritorio estas kapabla por enloĝigi 85 milionojn da loĝantoj laŭ la franca enloĝanta koeficiento, kaj 190 milionojn atentante la belgan koeficienton, kaj kies natura riĉeco de ĉiuj vidpunktoj, regule, normale ekspluatata, ne nur sufiĉas por la maksimuma loĝantaro aludita, sed por eksporti abundege, Kolombio, do, tiam bezonas ankaŭ sian kanalon interoceanan, kaj por ĝin fosi, ĝi posedas la plej bonan kaj malkaran el ĉiuj esploritaj vojoj. Meksikio nepre bezonas ankaŭ por ekspluati siajn naturajn riĉaĵojn interoceanan kanalon, kaj certe unu sola kanalo ne sufiĉas por la ekspluatado de tiu vasta mirinda teritorio, sur kiun verŝajne la Dioj verŝis tutplene la Kornon de l'Abundo.

Dume, la granda koloso de la Norda Ameriko ne laciĝas agadi por havigi al si perforte la rajtojn al iuj el tiuj kanaloj, kaj, proponante al la civilizita mondo la kontrakton Kellogg kontraŭ la milito, trompas la popolojn, ĉar Usono praktikadas la militon kaj perforton en Nikaragvo kaj aliaj teritorioj de la civilizita mondo; oni ne povas konscii, kiel civilizitaj popoloj povas atenti la proponon Kellogg kaj ĝin subskribi.



Belega turo de la Katedralo de Oviedo.

ESPERANTA MARŜO

(KANTEBLA PER MUZIKO DE «LA MADELON»)

I

Tra la Mondo, sur la Tero kaj la Maroj,
Jam aŭdiĝas forte nia rava kant';
Jam antaŭeniras, spite de la baroj,
Paca lingv' internacia Esperant'.

Jen belega nia standardo
Kun hele verda la kolor',
Sub ĝi kolektiĝas kun ardo
Soldatoj de la Pac' laŭ ĥor'.
Kaj Pacarmeo ja kantadas kun fervor'
Belajn ardajn himnojn, Esperojn de la kor'
Nian verdan flagon alten ni tenu,
Ce ĝia blanko lumu ĝia stel'.
Ne l' «Obstinaj baroj» nin detenu,
Brave marŝu al la cel'!

Ni marŝu; do, marŝadu kun kuraĝo
Car gvidas nin de l' koro «Nova Sent'».
Kaj nin atentis jam kun saĝo
Ciu gent', ĉiu gent', ĉiu gent'!

II

Nia lingvo tute bone jam progresas,
Firme tra la landoj de la tuta Mond';
Al popoloj grandan bonon ĝi promesas:
Transformiĝi forta «Familia Rond'».

Ni laboru varme senĉese
Sub verda flago de l' Esper',
Por forigi plene sukcese
Malamojn bestajn el la Ter'.
For, for de la Tero jam tiom da mizer',
Hombuĉado, ekspluatado kaj sufer'!

Nian verdan flagon alten ni tenu,
Ce ĝia blanko lumu ĝia stel'!

K. t. p.

Julio Mangada Rosenörn



Portalo de S. Domingo. Oviedo (Asturias.)

RECENZEJO

Ilustrita Biblioteko, dua serio (n-roj 6—10): *La Maro*.—La tuta serio (5 numeroj) kostas RM 2.—(sv. fk. 2.50); duontole bindita en unu volumo 172-paĝa, kun 8 ilustraĵoj de J. Comella kaj G. Zimmer, RM 3.60 (sv. fk. 4.50). Unuopaj numeroj kostas po RM 0.50. Eldonejo: Heroldo de Esperanto, Köln (Germ.), Brüsseler Str. 94.--Jen la titoloj de la unuopaj numeroj:

N-roj 6/7. *Gerstäcker* (Egruho): *La ŝipĉarpentisto*. Rakonto el la Pacifiko.

N-ro 8. El *Gorch Fock* (Jarczewski): *Navigado estas necesas*.—*D. P. Boatman*: *Kaprico*.—*A. Daudet* (Fischer): *Agonio de la Sémillante*.

N-ro 9. *Teo Jung*: *Gudrun*. Rakonto laŭ la mondfama mezepoka germana eposo.

N-ro 10. *Cunningham* (Newell kaj Sturmer): *La hantataj ŝipoj*.—*Russell* (Newell kaj Sturmer): *Suldpedelo sur la maro*.

Tre interesa serio pri scenoj de la marvivo, per kiu leganto konatiĝas kun multaj teknikaj vortoj nepre necesaj al maraj teknikaj aferoj, pro kio laŭdinda estas ilia enkonduko en nian leksikonon, sed ne absolute necesaj por pritrakti ion ajn ĝenerale, ĉar uzado de teknikaj vortoj postulas ĉu apartajn klarigojn (ĉi tion faris aŭtoroj kaj tradukintoj), ĉu devigas leganton multfoje uzi vortaron kaj multfoje ne trovi la vorton, kaj ĉi tio multe ĉagrenas; romanoj, historioj, rakontoj, k.t.p., por la ĝenerala publiko, postulas kiel eble plej simplan leksikonon kaj zamenhofan stilon, kaj eldonistoj, celante havi grandan sukceson, multe devas atenti ĉi tion: teknikaj vortoj por teknikaj aferoj. Kondamninde estas, ke aŭtoroj kaj tradukantoj enkonduku en nian lingvon vortojn, kies signifoj estas tute klare esprimataj de esperantaj radikoj de la vivkomenco de la lingvo, kaj la recenzanto opinias, ke eldonistoj devas malkonsenti la enkondukon por siaj eldonotaĵoj kuracante maniojn de aŭtoroj kaj tradukantoj, kaj se eldonisto ne tiel agas, recenzanto kondamnu la manion kaj konigu ĝin al publiko.

En la unua aperas ĉarpentisto; forkurinte el ŝipo en insulon por sin liberigi, li kreas sian familion, vivas trankvile meze de la indiĝenoj, kiujn li instruas laŭ eblo, ĝis alveno de ŝipo, tiu en kiu li deĵoris, pro kio okazadas interesaj aventuroj. Troaj

teknikaj vortoj utilaj; sufiĉe oftaj vortoj ne necesaj, ekzemple: *arkipelago* (preskaŭ hispana) anstataŭ *insularo*; *fugo* anstataŭ *forkuro* (ne atentante ke *fugo* estas muzika radiko); *apropos* (hispana ne kun signifo pri proksimeco, sed kun tiu de *okaze de tio*); *damni* (*malprofiti*); *kalebuzo* (se loko por kaptitoj, *kaptitejo*; hispane *calabozo*, *kalabozo*, estas ĉelo por iu aŭ iuj malliberigitoj); *glaso*, anstataŭ *deŝortempo*; *kvoto*, laŭ Verax ne signifas *parto*, sed nombro en karto por indiki altecon de loko; *imensa*, hispane *inmensa*, anstataŭ *grandega*; *eskapi*, hispane *escapar*, anstataŭ *forkuri*; *lofarbo*, ĉu de *lofi* kaj *arbo*?, se jes, ne ĝuste uzata, ĉar *lofi*, laŭ Verax estas alproksimigi eble la direkton de la longa akso de ŝipo al tiu de la vento; *dura*, tute hispana, anstataŭ *peniga* aŭ *dolorega*, eĉ *kruela*; *vanto* laŭ Verax ne estas *ŝnurŝtupetaro*, sed *ŝnurego* fiksita sur la supro de masto kaj sur la ŝipo por fortikigi la maston; *parduno* anstataŭ *vanto* precize; *povra*, hispane *pobre*; sed ĉi tiu adjektivo esprimas malriĉecon malpli ol *mizera* (*mizerrega*), pli sukcesa estus estinta la verkisto enkondukante *paŭperima* (de la latina vorto *pauperrimus*, superlativo de *pobre*=*povra*), k. t. p.

La dua temas: pri malsukcesa heroo luktado de fiŝkaptisto kontraŭ la maro; pri fraŭlino, kiu, revante pri amindumo de riĉulo, estas vekata de forta nobla konita metiisto konfesinta ardan amon lojalan per la rigardo al ŝi, kiu unue ŝanceliĝas sed tuj riproĉas al li lian malĝentilan konduton kaj lin rifuzas, kvankam ŝi lin amas, ĉar ŝi volas, ke li atendu, sed ĉi tiu forkuras... kaj si plenlarne, senespere, vidas lin sur ferdekon de ŝipo deiranata; fine, pri kortuŝanta ŝipoperco. En la unua temo aperas *stabila*, tute hispana; *vaĉi* (gardstari); *ŝekli*, laŭ la klarigo de la tradukinto ne alkonformiĝas al la esprimo de Verax; *lofo*, laŭ klarigo de la tradukinto, ankaŭ ne alkonformiĝas kun *lofo* de Verax = *ago lofi*, kaj *lofi*, laŭ Verax, estas alproksimigi la kapuson de ŝipo al la direkto de la vento. En la tria temo *rodi*, tute hispane *rodar*, en senco figura *vagi*, sed laŭ Verax *eluzi* per frotado kontraŭ alia substanco, kun intermeto de malmola pulvora substanco, ankaŭ dispecigi en malgrandaj eroj per frotado de la dentoj, de kio devenas la *roduloj*, klaso de animaloj kun specialaj dentoj por *rodi*.

Per la tria libro oni konatiĝas kun la bela reĝidino Gudrun, kiu forrabite de malamikoj, restadas fidela al amjuro spite de

ĉiaj humiligoj, atingante fine sian feliĉecon eĉ havigante samon al multaj aliaj kaj al popoloj, kiam post aventuroj, bataloj, k. t. p., ŝi atingas la liberecon. La aŭtoro uzas *jubililo*, kial? De *jubileo*, *jubileĝo*, ĉar por tio estas la sufikso *iĝ*, kaj neniel iu ajn rajtas kripligi radikojn, *ĉiam neŝangebla*; *grifo* estas fabela animalo kun korpo duone agla, duone leona, aperas sur blazonoj kaj arkitekturaĵoj; *pompanta*, anstataŭ *pompiganta*; *konkubino* estas tute hispana; *vadi*, por trairi neĝon; *vikinga* «*kio*»? demandos sin ĉiuj; *floto*, absolute hispana, anstataŭ *ŝiparo*; *timpano*, anstataŭ *timpanono*, ĉar *timpano* estas meza parto de la interna orelo kaj ankaŭ arkitektura vorto; *jubilego* anstataŭ *jubilego* aŭ *kontentego*. La aŭtoro forlasas *us* en okazoj kun *se*, se dubaj okazoj, devis li uzi *ĉu*; male iam uzas *us* sen *se*, kiam *as* estas pli ĝusta; li uzas *la* post *ĉiuj* «*ĉiuj la ŝiaj*» post *ĉiu*, *ĉiuj*, *ĉies*, oni ne devas uzi *la*; ne atentis li sufikson *iĝ*.

La kvara diras pri du legendaj ŝipoj dronintaj en golfero, kies restaĵoj aperas dum subiro de la maro, de kiuj aŭdiĝas misteraj voĉoj. De la drontago la ensorĉitaj ŝipoj pereigas ĉion trafantan siajn restaĵojn, kaj leganto scias pri kelkaj okazintaĵoj okaze de tia ensorĉo. Ankaŭ diras pri legoficisto ensipiganta por ke la ŝipo restadu ĉe la haveno laŭ juĝistordono, sed la ŝipestro ne atentis la ordonon kaj la ŝipo mareniras spite de minacoj de la oficisto. Ĉi tiu vivadas malagrablan ŝipvivon pro granda furiozo de la maro ĝis reveno de la ŝipo al la deirloko kaŭze de la uragano, kaj la ŝipestro estis devigata sperti monpunon. La titolo diras *hantataj* anstataŭ *ensorĉataj*; *genro* anstataŭ *genero*; la vento ne *tiras* ŝipon, sed ĝin *puŝas* aŭ *ŝovas*; *fokeno* anstataŭ *foko*; ne du fojojn en sama frazo; *morne* anstataŭ *melankoliige* aŭ eĉ *angore*; *ŝalmosonoj* anstataŭ *psalmosonoj*, ĉar *ŝalmo*, laŭ Verax, estas metala tubo, per kiu oni blovas aerfluon, aŭ fluon el oksigeno, en flamon por plivarmigi ĝin, tial *ŝalmoflamo* estas ne kantoj (piaj aŭ preĝaj) de rikoltantoj, sed bruoj de tiu aparato; *prancadi* anstataŭ *nerve hufobatadi*, ĉar la klarigo de la tradukintoj ne estas ĝusta, tial ke la ĉevaloj ne povas saltetadi starante sur la postaj kruroj, la ĉevaloj nur ekstariĝas sur la postaj kruroj ĉe la cirkoj, kaj kiam ili havas malbonan kutimon, kiun dresistoj malaperigas per edukado, ĉar la kutimo estas danĝera por rajdantoj; ĉu *purĝi* en angla lingvo signifas *laksigi* kaj «*pruvi sin senkulpa en juĝejo*».

en hispana lingvo (*purgar*) signifas ankaŭ *laksi* sed ne *pruvi sin senkulpa...*, sed tute la malon, *pasigi puntempon ĉe malliberejo*, *sufери punon ian ajn*; *sen peti* anstataŭ *ne petante*, ĉar *sen* oni ne devas uzi antaŭ infinitivo; *strikti* por kio pri la «velura veŝto», ĉar, laŭ Verax *strikti* esta sloko de la centra punkto de surfaco; *gapante*, ĉu *kaŭrirante*?

